

## & Liss Ulov Larsson:

< Ripete 15 sed rekante 11 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj.  
Norda Kantaro #4138. El sveda tradukis Kukoletto (1993). Politika satiro pri Liss Olof  
Larsson (1838-1896), sveda parlamentano de kampuloj de Dalekarlujo. Klarigoj (\*): '5  
Princo: reĝido ; Klina staro: riverenco. '6 Diri onklo al: esti familiece kun aĝulo.  
Dalekarloj famas pro tio ke ĉiujn, inkluzivub la reĝo, ili traktas als egalulo. '8  
Liptabako: sveda kutimo suĉi muelitan tabakon metitan inter supra lipo kaj dentoj.>

### (#Melodio:

<2,4:31> (h /So dodo do dodo Ti rere So o; SoSo Tire SoSo Tire do mimi so o;so la  
fafa fa fafa so dodo mi i; SoSo Tire SoSo Tire do o; )x8 )+

### (&Strofoj:

'1 /Liss Ulov Larsson al Stokholm per  
rel' ; bule fili, bule fili, Stokholm per  
rel' ; Li venis al reĝa loĝeja kastel' ;  
Bule fili, bule fili, bum.

'2 Sidis la reĝo kaj (': skribis sur tron')

(x:; **bule fili, bule fili,**)

(,: skribis sur tron' ;) kaj brile glimadis  
sur kapo la kron'

(x:; **Bule fili, bule fili, bum.**)

'3 "Saluton, kar-Liss," diris reĝo al mi  
..... "Mi celas konstrui fervojon por vi."  
.....

'4 "Jes," diris Liss, "mi kredas al sign'  
..... se ne estos fera, ni havos el lign'."  
.....

'5 Paŝis en pordo la princa par'\* .....  
princino sur sojlo en klina star'\*. ....

'6 "Aŭdu, kar-Liss," diris reĝo al mi .....  
"Ĉu rajtas la knab' diri onklo\* al vi?"  
.....

'7 "Jes," diris Liss, "rajtigu ni lin ..... kaj  
tion jam ankaŭ rajtu princin'." .....

'8 Princino min kisis sur buŝo kaj frunt'  
..... sed pro liptabako\* mi hontis kiel  
hund'. .....